

Mason Studdard

La virineto en bluo

Mason Stuttard

La virineto en bluo

Enhavo

[La virineto en bluo](#)

[Pri la aŭtoro](#)

[Kolofono](#)

LA VIRINETO EN BLUO

Petro Chesney malstreĉe sidis sur komforta brakseĝo antaŭ la fajro en la studĉambro de Domo Frayne. La ĉambro estis prilumita nur per la lumo de la grandega fajro el ligno-ŝtipoj, kiuj flamis kaj kraketis en la malnovmoda fajrujo. Sur la panelitaj muroj kaj skulptita plafono la saltantaj flamoj dancigis groteskajn ombrojn. La fajroardo plibeligis la malnovajn meblojn, kies brilo kaj koloroj ricevis pli riĉajn nuancojn de la varma, kvazaŭ-karesa lumo.

Tre plaĉis al Chesney viziti sian najbaron, Lordon Frayne, ĉar la malnovega domo posedis por li apartan ĉarmon. Sciante pri lia ŝato al la domo, Frayne jam antaŭ longe esprimis sian deziron, ke Chesney vizitu la domon, kiam ajn li dezirus, eĉ dum lia foresto. Tion li faris, kvankam oftaj ekskursoj alilanden malhelpis, ke li profitu la inviton tiom, kiom li dezirus. Li estis fraŭlo tridekkvinjara kaj loĝis kun fraŭlina fratino en kampara domo tri mejlojn de Domo Frayne. Li estis tipo serioza, iom studema, tamen amis la eksterdoman vivon. Estis tio, kio tiris lin eksterlanden, kie li serĉis kontenton en esploro de nemulte konataj regionoj kaj de eĉ malpli konataj gentoj. La societa vivo ne tre allogis lin, kvankam kiam li ĝin partoprenis, li ĝin ornamis ĉar li estis tia tipo, kiu povis trafi tujan popularecon en kia ajn socio. Filinohavaj patrinoj jam delonge sieĝis lin kun alta espero en koro.

Tamen, kiel lerta ŝipestro en danĝera markolo, li sukcesis eviti ĉiujn delogaĵojn. Ne multaj homoj, lin konantaj, sciis, aŭ eĉ suspektis, la revemon, kiu estis forta karakterero lia. Estis grandaparte tio, kio tiel forte lin inklinigis al admiro kaj ŝato de la domo de lia najbaro kaj amiko. Kiam li sin trovis sub tiu tegmento, li kvazaŭ ekvivis en alia mondo. Pripaŝante la longajn koridorojn kaj ĉambregojn, rigardante de supre sur la bele pargetitan balĉambron, malrapide suprenirante la faman ŝtuparon kun bele skulptita balustrado el kverkoligno, li lasis al sia fantazio krei por li scenojn kaj homojn el aliaj epokoj – belajn delikate vestitajn sinjorinojn kun krinolinoj, perukomitajn dandojn en silkaj pantolonetoj kaj bukohavaj ŝuoj, riĉajn kolorojn kaj elegantecon – kiuj, laŭ li, plej konvenis por tia fono kaj tia medio.

La propra hejmo estis bela malnovmoda domo, kiu estis por li tre kara. Tamen de knabaĝo li sentis fortan allogon al Domo Frayne. La ĉarmon de la domo li ne povis, nek provis klarigi al si, sed akceptis la fakton kiel naturan.

Sidante antaŭ la fajro, sin banante en ĝia varmo, li konsciis per sia tuta sentemo la sorĉan atmosferon de la domo. Ĝi lin ĉirkaŭis, kiel lankovrilo, varmige, lule, karese. Li gratulis sin, ke li estis hejme por ricevi la inviton al la tiuvespera balo, kiu laŭ ĉiuj atendoj estos bela grandioza afero.

Lian revadon abrupte disrompis subita lumigo. Gaja vira voĉo kriis, »Ha, jen vi estas, Chesney. Mi supozis, ke mi vin trovos ĉi tie. Pardonu, mi petas, ke mi interrompas vian sentimentaln revadon, fajrolumon, kaj tiel plu...« La gaja tono kaj rideto sur la vizaĝo de Frayne malebligis ofendiĝon kaj Chesney responde ridetis. »Tamen, mi deziras vin prezenti al mia kuzino, Betty. Mi diris al vi, ke ŝi ĉeestos hodiaŭ. Betty, jen nia freneza najbaro Petro Chesney ... freneza ĉar – ĉu vi iam aŭdis ion tiel stultan – li amindumas ŝtonojn. Estas tute vere, mi certigas vin...« kaj tiel plu, gaje petolante pri Chesney kaj kreante amikan atmosferon, dum la du murmuris formalajn konvenaĵojn.

Chesney notis, ke ŝi estas tre bela kaj li momente serĉis en sia memoro, ĉar li havis impreson, ke li vidis ŝin antaŭe. Tamen la momento pasis. Ne povis esti, ke ili jam renkontiĝis, ĉar Frayne diris al li, ke ŝi loĝas ie en la norda parto de la lando, kaj li certe ne forgesus tiel ĉarman fraŭlinon, se li renkontus ŝin.

Dum ĉi tiuj pensoj okupis Chesney, ili ĉiuj malrapide paŝis al la kameno. Betty Frayne kaj Chesney ekokupis la brakseĝojn ambaŭflanke de ĝi kaj Frayne mem staris dorson al la fajro kaj babiladis.

»Vi du nepre trovos komunan intereson. Betty estas aŭtoritato pri la familia historio. Ŝi povas diri al vi la precizan momenton, kiam mia respektinda prapatro, la malbonfama Rikardo Frayne, ĉesis esti vulgara rabisto, sed fariĝis per unu el tiuj kuriozaj metamorfozoj ŝajne tipaj nur de lia epoko, vere bluasanga nobelo kaj aristokrato,« li diris ridante.

Tio estis unu el liaj ŝatataj ŝercoj, ŝajne primoki sian devenon. »Kaj se vi dum momento haltos por spiri, Betty, jen Chesney reve ekparolos pri la belaj tempoj pasintaj, kiam viroj estis viroj kaj virinoj estis io pli ol aro da cigaredfumaj kokteltrinkaj edzoĉasantoj. Li estas nekuraceble romantika kaj efektive kredas je tio, la kompatindulo...«

Lin interrompis ridado kaj protestoj flanke de ambaŭ liaj aŭskultantoj. Kaj Betty kaj Chesney lin vorte atakis tiel, ke ŝajnigante timon, li

ekforkuris. Haltante ĉe la pordo, li diris ridetante, »Nu, laŭ via plaĉo – tamen, mi petas vian indulgon. Estas multaj aferoj, kiujn mi devas priatenti prepare por la balo. Do, bonvolu pardoni min. Mi vin vidis pliposte,« kaj li eliris.

Ankoraŭ ridante, Chesney kaj Betty daŭrigis la interparoladon. Ŝia voĉo havis kuriozan raŭketan kvaliton, kiun Chesney trovis aparte ĉarma. Betty siavice ne povis ne admiri la belforman vizaĝon kaj atletan sintenon de sia kunulo.

Ŝi diris, »Mia kuzo jam antaŭe menciis al mi, ke vi tre amas Domon Frayne. Mi estas kontenta pri tio. Mi opinias, ke ĝi estas mirinda domo. De mia infanaĝo mi ĝin amas, tamen nur malofte mi povas ĝin viziti. Mi loĝas en la nordo, kaj ne estas oportune venadi ĉi tien.«

Petro respondis, »Nu, tio kredeble estas la kaŭzo, ke mi ne renkontis vin antaŭe, Fraŭlino Frayne. Tamen ĉu vi povas klarigi al mi, kiel okazas, ke mi havas la impreson, ke mi ja vidis vin, aŭ almenaŭ iun, kiu tre similas vin?«

Ŝi ridetis. »Eble mi povas solvi la misteron. Mi estas tute certa, ke vi ne vidis min antaŭe. Tamen, se vi privagadis Domon Frayne tiel fervore, kiel mia kuzo kredigis al mi, vi ja nepre vidis *La Virineton en Bluo*, ĉu ne?«

Chesney kun komprena eklumo en la okuloj eksaltis. »Jen! Mi sciis, ke mi vidis vian vizaĝon ie. Kompreneble jes! Vi kaj ŝi estas similaj, preskaŭ kiel du pizoj en ŝelo. Kvankam mi ne vidis ŝin dum longa tempo, mi konfesas, ke estas mirinda simileco. Kaj nun, kiam mi pensas pri tio, estas eĉ pli surpriza koincido. Vi kaj *La Virineto* portas la saman nomon, ĉu ne?«

Lia kunulino ridis denove je lia miro. »Jes, estas tute vere. *La Virineto en Bluo* estis Betty, filino de unu el la Lordoj Frayne.« Ŝi fariĝis subite seriozmiena, eĉ malgaja. »Kompatinda *Virineto en Bluo* ... Ĉu vi konas la historion pri ŝi?«

Chesney enpenŝiĝe sulkigis la frunton. »Nu... mi pensu ... mi kredas, ke mi iam aŭdis ĝin ... ĉu ŝi sin mortigis?«

Betty kapjesis. »Ĉu vi scias ion aldone?«

Petro respondis per duba neo. »Mi kredas, ke mi aŭdis ion, tamen mi forgesis,« subite konfide, »nu, mi faros al vi konfeson. Ne priridu min, mi petas. Kompreneble mi scias, ke vi ne ridos. Vi, kiel mi, amas ĉi tiun domon.«

Ŝi jesis, kun kuraĝiga esprimo en la okuloj.

»Nu,« li daŭrigis, »vi sendube scias, ke iuj domoj havas ian atmosferon, etoson, tute sian, kvazaŭ propran individuan personecon. Tio estas tre

rimarkebla pri Domo Frayne. Ĉu vi ne konsentas?«

Betty respondis per vigla tono. »Kompreneble, Sinjoro Chesney. Tion mi sentas jam de jaroj. Ifoje mi sentis kvazaŭ iu parolas al mi kaj kvankam mi nenion aŭdas, mi iel scias, aŭ konscias, kio estas dirata. Ĉu tio ŝajnas al vi stranga?«

»Ne, ne, tute ne,« respondis Petro. »Jen ĝuste kion mi spertas. Tamen, por daŭrigi. Antaŭ longa tempo, kiam mi estis ĉirkaŭ dekokjara, mi aŭdis aludon pri *La Virineto en Bluo* kaj mi demandis, kio aŭ kiu tio estas. Maljuna servisto, se mi bone memoras, diris, ke tio estas portreto en la *Longa ĉambro*. Mi memoras nun, ke li diris, ke laŭfame la virineto hantas tiun ĉambron ĉar estis tie, ke ŝi sin mortigis. Nu, mi serĉis la *Longan Ĉambron* kaj eniris. Mi ne bezonis serĉi la portreton. Jen ĝi pendis, tuj kontraŭ la pordo. Mi ankoraŭ vidas tiun belan ridetantan vizaĝon, tiel vivosimilan, tiel ĉarman. Ŝi portas robon el blua atlaso. Certe genia mano pentris ŝin. Ŝi rigardis al mi rekte en la okulojn, kvazaŭ ŝi volus paroli. Tute kiel vivanta homo ŝi aspektis. Mi rigardis, rigardadis, ne povante deturni la okulojn de tiom da rava belo. Kaj subite...«

»Jes...subite...?«

»Kiel diri? Subite mi sentis timegon; tian timegon, kian mi ne antaŭe nek poste sentis, kvankam en diversaj mondpartoj mi travivis spertojn, kiuj ja estis harhirtigaj ... Mi forkuris el la ĉambro, pelite de blinda teruro kaj mi ne haltis ĝis mi trovis min malsupre apud la akceptejo. Kaj mi tremis tra la tuta korpo, kaj ŝvito gutis sur mia vizaĝo.«

Betty rigardis lin kun miro. »Sed kial vi timis? Kion vi timis?«

»Mi tute ne scias. Neniel mi povas klarigi al mi, kial mi tiel agis. Ŝajnas al mi, ke ne estas klarigo.«

»Tamen, kio okazis, kiam vi iris denove?« Betty demandis.

Petro hezitis antaŭ ol respondi. »Mi neniam iris. Mi ne vidis ŝin denove...«

Betty eĉ pli mire rigardis lin. »Ĉu vi efektive volas diri, ke dum tiom da jaroj vi eĉ ne unu fojon vizitis tiun ĉambron?«

»Jes. Mi konfesas, ke sidante ĉi tie kaj parolante tiel flegme pri la afero, mi iom hontas diri tion. Tamen estas vere. Nur unu fojon mi min trovis tute neatendite en la proksimeco de la ĉambro kaj en la momento, kiam mi konsciis, ke estas la *Longa Ĉambro*, mi eksentis kuriozan vibron ĉe la spino. Mi tuj forrapidis. Mi povas doni nenan klarigon, mi eĉ ne kapablas priskribi la senton. Mi supozas, ke estas simile al la kurioza fenomeno, kiu

iafoje antaŭenpelas primitivulon en blinda teruro. Mi vidis tion. La homo kuras, nenion vidante, nenion sciante, krom la timego, kiu lin tute regas, lin obsedas, kaj la racion kaj la saĝon forigas ... Kaj tamen, mi ne estas primitiva. Kia mistera potenco povas esti, kiu faris min, klerulon, instruitulon, malpli prudenta ol indiĝeno de Centra Afriko?»

Rigardante la seriozegan mienon de sia kunulo, Betty subpremis sian unuan impulson malgravigi la aferon. Ŝi estis leginta pri kuriozaj fenomenoj de la psikologio kaj la penso trafis ŝin, ke eble Chesney suferas de ia psika nenormalaĵo.

»Nu,« ŝi diris, post longa silento, »mi tute ne volas diri, ke mi komprenas la aferon. Tamen, ni devas esti raciaj. Mi tre ŝatas tion, ke vi konfidis je mi kaj mi gardos vian sekreton. Mi akceptas vian parolon kaj kredas senrezerve, ke vi ja spertis tion, kion vi priskribis. Mi demandas min nur ĉu estis saĝe aŭ racie tion akcepti sen plua esploro.«

Petro ne sciis, kion respondi. Tiu aspekto de la afero neniam trafis lin kaj li konfesis tion. »Nun, kiam vi min atentigas pri tio, mi supozas, ke mi devus esti farinta ion. Tamen, kion fari? Mi estis nur juna, kaj poste la impreso daŭris tiel forte...«

Betty rapidis aldoni, »Ho, ne pensu, ke mi malestimas vin sekve de via konduto. Mi jam legis pri similaj, ŝajne neklarigeblaj aferoj. Ili estas iom oftaj. Tamen laŭ la ĝenerale akceptita teorio, se oni esploras siajn timojn kaj trovas la kaŭzojn, la timoj diseriĝas kaj montriĝas nur groteskaj ombroj de iuj infanaĝaj psikaĵoj.«

Petro konsente kapbalancis. »Jes, pri tio mi legis, tamen...«, li haltis je duba tono.

»Nu, se mia opinio iel valoras, mi konsilas, ke vi kiel eble plej baldaŭ vizitu la *Longan Ĉambron* kaj spitu vian fatamorganon. Alie, eĉ se vi neniam denove vidus la *Virineton*, vi certe iam pripensos la okazon kaj eble en la sekreta angulo de via animo vi malestimos vin. Ĉu vi ne konsentas?»

Li longe pripensis. »Nu, povas esti,« li fine diris. »Pasis kelke da jaroj de kiam mi ĝin spertis kaj eble mi faris eraron tiel eviti ĝin. Mi konfesas al vi, ke mi jam ofte malestimis min, sekve de mia malkuraĝo, kaj tamen, kiam mi memoras la okazaĵon, mi estas devigata allasi al mi, ke mi ne povus alie agi.«

Betty ridetis, »Jen tasko por mi, eltrovi la misteron, des pli ĉar ĝi tuŝas mian praparencinon. Parenteze, Sinjoro Chesney, mi devus konigi al vi eĉ alian koincidon, kiun vi videble ne scias. La historio de la *Virineto en Bluo*

estas jena: Ŝin ekamis junulo, kiu loĝis en la ĉirkaŭaĵo. La legendo diras, ke li estis iom libera je siaj amfavoroj, sed Betty Frayne ne volis tion kredi. Ŝi lin amegis, plenkore, tutfide, sed nesaĝe. Cetere, la familianoj opiniis, ke post la edziĝo li pli dece kondutos kaj ĉesigos siajn ampetolaĵojn. Oni aranĝis la geedziĝon kaj Betty estis feliĉega.«

Ŝi haltis momenton kaj rigardis Petron.

»En la mateno de la tago en kiu la edziĝo devis okazi, li forkuris kun alia virino. Betty sin ĵetis el fenestro de la *Longa Ĉambro* kaj mortis. La junulo nomiĝis ... Petro Chesney!«

Petro preskaŭ elsaltis el la brakseĝo. »Kio! ... Mia Dio! Kio estas ...? Mia nomo! Ho, ne povas esti! Ĉi tio kondukas al frenezeco! Petro Chesney kaj Betty Frayne en ĉi tiu sama domo! Ne, tio estas tro granda koincido. Vi certe faris eraron, Fraŭlino Frayne. Estas nekredeble!«

Betty levis la ŝultrojn. »Nu, kredu aŭ ne kredu, laŭ via plaĉo. Tamen, se mi eraras, la tuta familia historio eraras. Mi konas tiun historion pri la *Virineto en Bluo* jam de infanaĝo, kiel estas kompreneble ĉar mi portas la saman nomon. Tuj kiam mia kuzo diris al mi vian nomon, mia koro momente ne batis.«

Petro profunde spiris. »Mi petas vian pardonon, Fraŭlino Frayne. Mi devas kredi vin. Tamen vi devas allasi, ke la cirkonstanco estas nekredeble fantazia. Se mi legus tion en romano, mi forjetus la libron kaj priridus la troan genion de la aŭtoro. Kion ĝi signifas, se signifon ĝi povas havi?«

Betty kunsente ridetis. »Nu, mi inklinas senti kiel vi, kaj tamen ekzistas racia klarigo. Kial tio ĉi ne okazu? Estas tute klare, ke tiu Petro Chesney estis prapatro via, kiel Betty Frayne estis praparenco mia. Vi loĝas apude kaj vizitadas la domon. Jen mi vizitas mian kuzon. Do, la afero estas tute racie klarigebla, kvankam ne ĉiutaga okazaĵo.«

»Jes, kiam vi tiel malvarmsange ĝin prezentas. Tamen, kia koincido!«

En tiu momento la granda horloĝo per bazsonoraj tonoj batis la horon.

»Ho, ĉielo!« ekdiris Betty. »Mi devos forrapidi, alie mi malfruos je la manĝo.«

»Ankaŭ mi. Mi devos min revesti,« diris Petro ekstarante. »Do, mi vidos vin poste. Mi esperas, ke Frayne aranĝis, ke ni kune sidu ĉe-table. Kaj mi tre dankas al vi, vi estas tiel kompleza.« Kaj malferminte la pardonon, li sekvis ŝin eksteren.

La granda balĉambro estis plenplena. En la longa historio de tiu salonego kaj malgraŭ la imponaj scenoj, kiuj nepre vidiĝis tie, estas dube, ĉu homaj okuloj iam rigardis al pli brilega kaj pli kolorplena vidaĵo ol tiu, kiu sterniĝis antaŭ Betty kaj Petro kiam ili kune staris sur la balkono kaj gaje interparolis.

Ili sin klinis sur la balustrado kaj rigardis la ĉiam ŝanĝiĝantan scenon malsupre. La planko de la ĉambrego aspektis kiel magia tapiŝo, kies koloroj senĉese moviĝas, formantaj kuriozajn desegnojn kiuj siavice diseriĝas kaj regroupiĝas preskaŭ antaŭ ol la rigardo povis ilin registri.

Estis la lasta vespero de la jaro kaj la Gelordoj Frayne okazigis sian ĉiujaran kostumbalon. Ĉie sonis rizado kaj gajo. Frue en la vespero la sukceso de la festeno estis evidenta kaj nun ĉio iris bone kaj kontentige por gastoj kaj gastigantoj. Muzikis tre talenta dancorkestro kaj sur la fame konata planko dekoj da piedoj kunglitis en ritmo kaj harmonio.

Chesney parolis. »Fraŭlino Frayne, estis ja bela ideo via, vin vesti per blua atlaso. Mia koro preskaŭ ĉesis bati, kiam mi unue ekvidis vin. Mi kredis dum momento, ke la fantomo de la *Virineto en Bluo* primarŝadas.« Li ridetis. »Tiu modo tre konvenas al vi. Tiu alia Petro Chesney nepre estis malsaĝulo. KREDU al mi, vi estas tre tre bela hodiaŭ vespere.«

»Ho, flatulo!« ride respondis Betty, tamen kontenta je la admiro, kiun ŝi elvokis. »Ankaŭ al mi plaĉas via vesto. Mi supozas, ke via prapatro portadis iom similan kostumon. Ĉu ni iomete marŝu tra la domo. Domo Frayne estas aparte bela nokte, kiam la plena luno brilas tra la fenestroj.«

»Bela ideo,« entuziasmis Petro, proponante sian brakon, kaj la paro malrapide forpaŝis laŭ la koridoro en la silenton.

Komence ili renkontis aŭ preterpasis aliajn homparojn, kiuj ŝajne trovis la lunlumigitajn koridorojn laŭ sia gusto; sed baldaŭ ili jam ne trafis pluajn kaj marŝis, kviete interbabilante. Iafoje ili haltis antaŭ fenestro por rigardi eksteren sur la belan terenon, kiu etendiĝis ĉiudirekten de la domo.

Petro diris, »Ĉu la malnova domo ne estas belega? La lunlumo aldonas mirinde al ĝia ĉarmo. Ĉi tiuj ĉambroj kaj koridoroj ŝajnas ekposedi nerealan, kvazaŭ fean kvaliton, tute mankan dum la tago, ĉu ne?«

Betty subite premis lian brakon. »Ho, Sinjoro Chesney.« Ŝi haltis momenton kaj Petro rapide intermetis, »Nu, kial ne nomi min Petro? Estas multe pli neformale kaj amike ol sinjorumado, ĉu vi ne konsentas?«

Ŝi ridete respondis. »Kompreneble, se vi volas. Tamen, nur kondiĉe, ke vi delasos la *Fraŭlino*-n kaj nomos min simple Betty.«

»Bone. Konsentite! Nu, kion vi estis dironta... Betty?«

»Ho jes... Petro ...« Ili kune ridis. »Min trafis bela ideo. Ni iru al la *Longa Ĉambro* por rigardi la *Virineton*. Nepre estas belege tie, en tia lunluma nokto, ĉu ne?«

Petro haltis kvazaŭ ŝtonigita. Kurioza esprimo sin vidigis sur la vizaĝo. »Ho, Betty... kial vi volas ĉion malbeligi? Ĝuste kiam ni estas tiel feliĉaj...«

Ŝi rigardis lin. »Ĉu vi timas?« ŝi demandis per tono samtempe akuza.

»Ne, ne... kompreneble ne. Nur estas, ke mi ne sentas inklinon tien iri. Kial ni iru tien... estas bele ĉi tie...?«

Malrapide ŝi kapbalancis, notante lian embarason. Li ne volonte rigardis al ŝi rekte en la okulojn.

»Petro,« ŝi diris, klare kaj malrapide, »vi timas. Hodiaŭ vespere vi honoris min per konfido pri via sekreto rilate la *Longan Ĉambron*. Mi sentis deziron helpi vin. Mi ankoraŭ deziras. Jen bela okazo por spiti tion, kio vin timigis. Dum mi min revestis, mi pripensis la aferon kaj mi estas konvinkita, ke vi povos ĝin venki, se nur unu fojon vi ĝin spitos.«

»Betty,« li diris, malfeliĉe, »estas tre kompleze, tamen, vi ne povas scii, kiel mi sentis...«

»Do,« ŝi interrompis, »mi estis prava. Vi timas. Petro,« ŝi impulse premis al li la brakon kaj pliproksimiĝis al li, »venu. Mi estos kun vi. Nenio malbona povos nin trafi kaj mi estas certa, ke poste vi jam ne timos.«

Li staris en silento kun kapo klinita. Fine, mallaŭte li diris, »Nu, laŭ via plaĉo. Ni iru.«

Ŝi ridetis. »Brave, Petro. Venu,« kaj ili kune ekmarŝis laŭ la koridoro al ŝtuparo en la fino. Betty vigle babiladis, sed Petro limigis sin je neoj kaj jesoj. Eble ŝi iomete komprenis la sentojn, kiuj lin maltrankviligis, kaj provis kiom eble lin distri. Post nelonge ili alvenis al pordo, antaŭ kiu ili haltis.

»Ha, jen ni troviĝas! Ni eniru,« ŝi diris, kaj per rapida movo, ŝi ĵetmalfermis la pordon. Ili eniris. Ĝi estis longa mallarĝa ĉambro kaj la taŭgeco de la nomo estis pli emfazita en la griza lumo. La pordo sin trovis en unu el la longaj muroj kaj frontis al la fenestrohava ekstera muro. La fenestroj estis altaj kaj larĝaj kun malaltaj sojlobretoj. En la spacoj inter la fenestroj pendis diversaj portretoj.

La malvarmaj radioj de la plena luno oblikve brilis tra la vitroj kaj verŝis neterecan lumon en la ĉambron, ĝin prilumanta. Nur la muro kontraŭ

ili staris en ioma ombro.

Tie pendis la *Virineto en Bluo*.

Malrapide ili ĝin alpaŝis. Iom post iom iliaj okuloj alkiutimiĝis al la krepuskeco. La detaloj de la pentraĵo grade malkaŝiĝis al ili per la respegulita lunlumo, ĝis fine ili povis klare vidi la belan dolĉan vizaĝon de la virineto.

Povas esti, ke la stranga lumo iel nuancigis la portreton. Estu kiel ajn, la *Virineto en Bluo* ŝajnis rigardi al ili kun aparte kortuŝa, malgaja rideto, plena je amara sopiro.

»Kiel bela ŝi estas!« murmuris Betty. Laŭte paroli ŝi ial ne povis.

Petro rigardis la portreton longe kaj atente. Stranga lumo ekbrilis en liaj okuloj. Esprimo de ekstazo iom post iom sin vidigis sur lia vizaĝo, kvazaŭ li rigardus al io netera, nehoma. Fine la lipoj kurbiĝis je rideto. Li profunde enspiris kaj, kvazaŭ vekiĝante el sonĝo, li sin turnis al Betty.

»Jes. Kiel rave belege! Ho, Betty, mi estas tre kontenta, ke ni venis. En la momento, kiam ni staris antaŭ la pordo, mi ekteruriĝis. Tamen, veninte en la ĉambron mi sentis tujan trankvilecon. Estas kurioze; mi havas nenian timosenton.«

Betty ridetis. »Mi estas tre feliĉa, Petro.«

»Ankaŭ mi,« li diris. »Imagu, kiom da jaroj mi malŝparis, kaj rabis de mi la eblecon ĝui ĉi tiun trezoron. Vere estas kvazaŭ miraklo. Povus esti du el vi, unu en la kadro kaj unu antaŭ miaj okuloj. Rigardante, mi inklinas forgesi, kiu estas la realo kaj kiu la portreto, tiel mirinde vivosimila ĝi estas!«

Ambaŭ ridis. Kelkan tempon ili diskutis kaj admiris la majstroverkon sur la muro. Fine Betty diris, »Nu, Petro, antaŭ ol reiri al la balĉambro, ni devus fari finan eksperimenton. Ni ne tute provis vian spitemon. Ne forgesu, ke mi estas ĉi tie, kiel morala apogo. Por efektiviĝi vian tutan kaj nepridubeblan liberiĝon de spirito, mi opinias, ke vi devus resti kelkan tempon en la ĉambro, sola. Ĉu ne?«

Petro serioziĝis. »Sola, Betty? Kial?«

»Nu, estas kompreneble. Se vi nur unu fojon restos ĉi tie sola, tiam vi povos esti tute certa, ke vi venkis vian timon. Do, mi proponas eliri kaj resti ekster la pordo dum kelke da minutoj. Vi ja povos tion elporti, ĉu ne?«

»Sed, Betty, ĉu estas saĝe aŭ utile daŭrigi ĉi tion? Mi certigas vin, ke mi tute ne sentas timon.«

»Nu, des pli bone. Estas tre saĝe, la plej saĝa afero en la mondo. Ne kontraŭdiru... Mi iras nun,« kaj karese frapetante lian manon, ŝi formarŝis. Malrapide la pordo fermiĝis post ŝi. Li estis sola en la *Longa Ĉambro!*

La abrupta foriro iomete lin konfuzis. Li rapide turnis la kapon por ĉirkaŭrigardi, kvazaŭ li atendus vidi ion aŭ iun. Okazis nenia moviĝo, nenia sono. Estis tombe silente. Li subite konsciis pri malvarmo kaj ekfrostotremis. Por ion fari, li paŝis al la fenestro por ĝin fermi. Tamen ĝin atinginte, li haltis kaj elrigardis. La bela parko de Domo Frayne etendiĝis sub li en la malvarma arĝenta lumo de la vintra luno. Bela kaj trankvila aspektis la pejzaĝo. Estis lume, preskaŭ kiel dum tago kaj la detaloj de la bedoj estis klare videblaj. Pretere la arboj nudabranĉe staris en silento, kiel gardistoj. Neniu venteto movis ilin.

Paco ĉie.

Admirante la vidaĵon, li momente forgesis sian ĉirkaŭaĵon, ĝis subite li kredis aŭdi flustron. Li ekrigidiĝis kaj la spiro haltis.

Li streĉis la nervojn por pli bone kapti iun sonon. Jen denove... sono, soneto, kiel zefiro en somera tago, aŭ kiel ĝemspiro...

»Petro...«

Lia nomo! La koro momente ĉesis bati kaj poste ekbatis rapide. Li tremetis kaj sentis kuriozan malfortecon en la kruroj...

»Petro!«

Denove trafis lian orelon mallaŭta kvazaŭ spirata alvoko. Kun larĝe malfermitaj okuloj li direktis sian rigardon al la loko de kie ŝajne venis la sono. Ĉu li imagas, li demandis al si, aŭ ĉu efektive io moviĝas tie en la ombro apud la portreto?

Jen denove. Li volis kriegi, sed trovis, ke lia lango gluiĝis al la palato. La buŝo sekiĝis. La haroj ĉe la nuko ekhirtiĝis. Tie antaŭ li staris io diafaneca, nebuleca. Ĝi malrapide aliris kaj li vidis, ke ĝi havas formon.

Subite li ĝin rekonis kaj kun la rekono lia teruro pliiĝis.

Estis la *Virineto en Bluo*. Ŝiaj lipoj moviĝis, kaj atingis lin denove tiu kurioza murmureto, pli senteblo ol aŭdebla.

»Do, fine vi venis al mi, Petro... Mi sciis, ke vi venos... Mi vin atendas tiel longe...«

Ŝi pliproksimiĝis kaj etendis la brakojn al li. La vizaĝo lumis je amo kaj sopiro. Subite li povis paroli. Li kriegis, »Ne! Ne! Ne venu! Mi diras al vi... Haltu!...«

Ŝi haltis. La vizaĝesprimo malgajiĝis.

En tiu momento la pordo malfermiĝis. Betty eniris. Vidante Petron ŝajne rigardantan al ŝi, kun teruro, ŝi murmuris, »Kio estas, Petro? Ĉu vi parolis?« kaj alkuris al li.

Antaŭ ol ŝi povis lin atingi li kriis per raŭka voĉo, »Ne tuŝu min!« kaj por ŝin eviti li saltis malantaŭen preter ŝia atingo. Liaj kruroj trafis kontraŭ la fenestrojlon kaj sen ia sono li elfalis kapon antaŭen...

Post rapida, terurita rigardo malsupren al la korto, Betty kuregis el la ĉambro kaj laŭ la koridoro laŭte alvokante helpon. Malsupre de la granda ŝtuparo renkonte alkuris ŝia kuzo, al kiu per malkohera parolo interrompata de grandaj plorĝemoj ŝi konigis la fakton pri la falo.

Transdonante ŝin al la gardo de sia edzino, li fulmrapide elkuris petante la helpon de kelkaj apudstarantaj sinjoroj.

En la ĝardeno li trovis sian amikon. Nenece estis esplori. La pozicio de la korpo estis memklariga. La aliaj rapide alkuris. »Kio estas?« diris la unua, kaj subite vidis Petron. »Mia Dio!... Ĉu li...«

Frayne jesis per sufokita voĉo. »Jes. Rompita kolo...«

PRI LA AŬTORO

Mason Stuttard naskiĝis en 1903 en Burnley kaj mortis en 1983 en Blackpool. Li estis brita esperantisto.

Ekde 1951 li estis Konstanta Kongresa Sekretario de UEA. Li verkis la lernolibrojn *The Esperanto Teacher* eldonitan en 1954 kaj kun Edward G. Lock *Nelsons Esperanto Course*.

Mason Stuttard estis en Jugoslavio »fine de la Dua Mondmilito«, sed ne estas konate, kial kaj kiam li iris tien. Li estis la persona anglalingva tradukisto de marŝalo Tito kaj revenis al Britio, kiam li pensiiĝis en la 1960-aj jaroj.

»La Virineto en bluo, kaj aliaj rakontoj« estas kolektoj de 13 rakontoj originale verkitaj de Mason Stuttard.

(Laŭ informoj de Wikipedia kaj aliaj fontoj)

KOLOFONO

Titolo

La virineto en bluo

Aŭtoro

Mason Stuttard

Originalo

Heronsgate: The Esperanto Publishing Co. Ltd, 1946 (serio *La Epoko Libroj*, vol VIII).

Elektronika eldonajo

Michael Lennartz, 2023